

Esperantista

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

A. Malík:

Naše vnitřní ekzekutiva:

Svoji vnitřní výstavbu musíme postavit na zdravé základy. Těmi je naše členstvo a proto EAČSR pro vnitřní práci zavádí systém důvěrníků »perantoj« a to:

»lope« = loka peranto de EAČSR, místní důvěrník (ten má býti všade, kde je aspoň jeden esperantista).

»dipe« = distrikta peranto, okresní styčný orgán (těch bude tolik, v kolika okresích bude esper. činnost). »dipe« si vyhlédne vhodné »lope« a s nimi spolupracuje na výstavbě EAČSR.

»repe« = regiona peranto, krajský orgán EAČSR (těch bude 19, t. j. 13 v Čechách a 6 na Moravě). Regiono Opava jsme zatím dali Ostravě, takže máme krajů 19 celkem; »repe« si vyhlédne pracovitě »dipe« a s nimi se snaží dosáti, aby v každém okrese bylo nejméně 10 esperantistů — dobrých — kteří budou první buňkou našeho nového hnutí. Bez těchto prvních 10 v každém okrese nelze mluvit o úspěchu esperanta v brzké době.

»lape« = landa peranto, zemský kontrolní orgán, na Moravě jeden pro regiony čís. 14—19, tedy 6 krajů s 51 okresy. V Čechách 2 »lape« a to jeden pro Čechy-sever, regiony č. 1—3, 6—9 s 81 okresy a druhý pro Čechy-jih, regiony č. 4—5, 10—13 s 63 okresy; »lape« pečují o zemskou propagaci v krajích a zkušenosti v jednom kraji přenáší do druhého. Vedou listy poštovních výdajů svých a »repe«; spolupracují úzce s ĝenerala sekretario de EAČSR, který si vyhledá vhodné osoby pro »lape«. Nejlépe takové samideany, kteří mohou levně a často jezdit na delší cesty. »lape« musí býti iniciativní a výborný esperantista; navrhuje vhodné osoby pro funkci »repe«.

Přesnější pokyny pro všechny »perantoj«, budou vydávány zvláště.

Důležitě pro »lape«, »repe« a »dipe«:

Rozdělení krajů dle čísel a polohy:

I-a REGIONO PRAHA, *peranto*: So. Šustr Jar. Praha I, Benediktská 11.

Distriktoj: I + V, III + IV, II + VI, VII, VIII, IX, X, XI, XII, XIII, XIV, XV, XVI, XVII, XVIII, XIX, ent. (16).

II-a REGIONO KLADNO, *peranto*: Fino. Vlčková B. Kladno III, Tichá 10.

Distriktoj: Kladno, Kralupy n. Vlt., Louny, Rakovník, Roudnice n. Lab., Slaný, Žatec, ent. (7).

III-a REGIONO MLADÁ BOLESLAV, *peranto*: So. Šolc Karel Mladá Boleslav, Železná 41.

Distriktoj: Mladá Boleslav, Dubá, Mnichovo Hradiště, Jičín, Mělník, Nymburk, Poděbrady, ent. (7).

IV-a REGIONO PRAHA-EKSTERA, *peranto*: So. Echtner Vuk, Praha-Nusle II, Na Veselí 738.

Distriktoj: Beroun, Brandýs n. Lab., Český Brod, Hořovice, Jílové, Praha ekstera-sudo, Praha ekstera-nordo, Příbram, Říčany, ent. (9).

V-a REGIONO PLZEŇ, *peranto*: So. Kavan Fr. Plzeň II, Alešova 2.

Distriktoj: Plzeň, Blatná, Domažlice, Klatovy, Královice, Planá, Plzeň ekst., Přeštice, Rokycany, Tachov, Horšovský Týn, Stříbro, Sušice, ent. (13).

ARGUMENTO POR MIA SPEGULO.

*Mi fariĝis kvindekjara,
bela aĝo por junulo!
Por junulo kvindek... hara,
kiel mokas la spegulo...*

*Sed spegulatestoj pravas
nur laŭ fuĝa perspektivo
kaj malofte ili havas
stampon de l'definitivo.*

*Kvindekjara-kvindekhara,
hodiaŭa ekvilibro
estos jam bilanc' erara
en morgaŭa kontolibro!*

*Sed pro kio mi rezonas
pri similaj bagateloj
kun spegulo, kiu konas
nur la lingvon de l'marteloj?*

*Se vi volas argumenton,
ĝin mi tiel ĉi formulas:
»Ofte neĝas sur tegmenton
dum interne tajro brulas!«*

*Sekve sciuj, mia knabo,
ke mi havas ĝis nunhoro
kvindek jarojn sur la kapo,
sed... nur dudek en la korol*

(El Amer. Esperantist, majo-junio.)



Fr. Baĉura en domo de samideano
Anastas en Betlehem.

K. Havlíček Borovský:

**STURNO, POETO KAJ AZENO
SUB TILIO.**

*Venis foje al ĝardeno
vers-faranto kun azeno.*

*Amikparo samgenia
staris antaŭ arb' tilia.*

*L' arbo branĉon disetendas,
branĉon ronda truo tendas,
sub la branĉo liro pendas.*

*Lir' por fraŭlo mens-facila,
tru' por sturno - bird' babila,
branĉo por azeno vila.*

*Vi poet', muzikon kultu,
vi birdet' en tru' aŭskultu!*

*Frapis la poet' al kordo...
Bird' ektimis, flugis for do.*

*La azeno ĉesis manĝi
kaj grumblante fuĝas jam ĝi.*

*Nur la arbon frapas ŝoko:
Ĝi ne povas for de l' loko!*

El la ĉeĥa Dr. T. Pumpr.

Ni legis.

Sennaciulo, oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda aperas depost julio 1946 kun sia malnova titolo en 17-a jaro, redaktata de L. Bannier en Paris kaj Bas Wels en Rotterdam, eldonata de C. van Essen, Floretstraat Rotterdam Z. —

En la ĉefartikolo diras Fritz Küster, iama redaktoro de »Das andere Deutschland« revuo, en kiu verkis ankaŭ Carl v. Ossietzky, pri »La germanaj kontraŭ-faŝistoj«: Ĉie ni, kontraŭ-faŝistoj kaj batalantoj de la enlanda fronto, salutis la aliancajn soldatojn kiel liberigantojn kaj samliganojn. Kun ili ni esperis daŭrigi la batalon sur la enlanda fronto. Ni spertis seniluziigon. Baldaŭ montriĝis, ke oni batalis kontraŭ Germanio, ke ni ne estas samligaroj sed... Germanoj. Oni ne faris diferencon inter nazioj kaj kontraŭnazioj. — Supraĵaj observantoj opinias, ke su-

VI-a REGIONO KARLOVY VARY, peranto: So. Milek Fr. Karlovy Vary, Koněvova 5.

Distriktoj: Aš, Falknov, Cheb, Jáchymov, Kadaň, Kraslice, Mariánské Lázně, Loket, Nejdeč, Podbořany, Teplá, Karlovy Vary, Vejprty a Žlutice, ent. (13).

VII-a REGIONO ÚSTÍ N. LAB., peranto: So. Dušek Jaroslav Ústí nad Labem, Střekov II, Jeseniova 243.

Distriktoj: Děčín, Bilina, Duchcov, Chomutov, Litoměřice, Most, Teplice-Šanov, Ústí n. L., ent. (8).

VIII-a REGIONO LIBEREC, peranto: So. Novotný Boh. Liberec, Pražská ul. 3.

Distriktoj: Frýdlant, Jablonec n. Nisou, Jablonné v Podještědí, Jilemnice, Liberec ekst., Česká Lípa, Rumburk, Semily, Šluknov, Turnov, Varnsdorf, Liberec, ent. (12).

IX-a REGIONO HRADEC KRÁLOVÉ, peranto: So. Pytloun Frant. Hradec Králové, Riegrovo nám. 1010.

Distriktoj: Broumov, Nový Bydžov, Dobruška, Dvůr Králové, Jaroměř, Náchod, Nová Paka, Rychnov n. Kn., Trutnov, Vrchlabí, Hradec Králové, ent. (11).

X-a REGIONO PARDUBICE, peranto: So. Jandík Pardubice, Husova 87.

Distriktoj: Chrudim, Litomyšl, Vys. Mýto, Pardubice, Polička, Ústí nad Orlicí, Žamberk, ent. (7).

XI-a REGIONO HAVLÍČKŮV BROD, peranto: So. Ing. Řebíček Jarom. Havlíčkův Brod, nádraží.

Distriktoj: Havlíčkův Brod, Čáslav, Kutná Hora, Humpolec, Chotěboř, Kolín, Ledec n. Sáz., ent. (7).

XII-a REGIONO TABOR, peranto: So. Ing. Krajic Lad. Tábor, Jeronýmova 1984.

Distriktoj: Benešov, Kamenice n. Lípou, Milevsko, Pelhřimov, Sedlčany, Tábor, Vlašim, ent. (8).

XIII-a REGIONO ČESKÉ BUDĚJOVICE, peranto: So. Ploss Jos., České Budějovice, Skuherského 63.

Distriktoj: České Budějovice, Jindřichův Hradec, Kaplice, Český Krumlov, Písek, Prachatice, Strakonice, Třeboň, Týn n. Vlt., ent. (9).

XIV-a REGIONO JIHLAVA: (VAKAS).

Distriktoj: Moravské Budějovice, Jihlava, Moravský Krumlov, Dačice, Velké Meziříčí, Třebíč, Znojmo, ent. (7).

XV-a REGIONO BRNO, peranto: So. Geryk Jan Brno, Falkensteinova 8.

Distriktoj: Boskovice, Brno ekst., Hustopeče, Nové Město na Mor., Mikulov, Tišnov, Moravská Třebová, Vyškov, Brno, ent. (9).

XVI-a REGIONO OLOMOUC, peranto: So. Blažek Vlast. Olomouc, Dvořákova 36.

Distriktoj: Moravský Beroun, Holešov, Hranice, Kroměříž, Litovel, Olomouc ekst., Prostějov, Přerov, Rýmařov, Šternberk, Šumperk, Zábřeh, Olomouc, ent. (13).

XVII-a REGIONO ZLÍN, peranto: So. Bláha Fr. Zlín, Potoky 2450.

Distriktoj: Uh. Brod, Hodonín, Uh. Hradiště, Kyjov, Zlín, ent. (5).

XVIII-a REGIONO OSTRAVA, peranto: So. Slaný Vlad. Ostrava IV. Třebízského 29.

Distriktoj: Fryštát, Nový Jičín, Valašské Meziříčí, Místek, Český Tešín, Vsetín, Ostrava, ent. (7).

XIX-a REGIONO OPAVA, peranto: (VAKAS) zorgas So. Slaný el Ostrava (ĝis nun).

Distriktoj: Bílovec, Bruntál, Frývaldov, Hlučín, Krnov, Opava ekst., Opava, ent. (7).

Krajů v Čechách jest 13 se 144 okresy, na Moravě jest 6 s 51 okresy, celkem 195 okresů.

Naše heslo: »Do konce roku 1946 na každém okrese nejméně 10 dobrých esperantistů.«

Přesný název Svazu jest: Svaz esperantistů československé republiky, Svaz esperantistov československej republiky, Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka respubliko (zkratka: EACSR).

Olga Scheinpflugová: Nürnberg.

Ni publikigas tradukon de impresoj el vizito de Germanujo de ĉeĥa verkistino kaj aktorino publikigitaj en tagjurnalo Svobodné noviny la 3. IX. 1946, por doni al niaj eksterlandaj legantoj eblon informiĝi pri ĉeĥa vidmaniero al la Nürnbergaj tragikajoj.

Frakasigo de germanaj urboj, milfoje priskribita per la plej spertaj plumoj de la mond-jurnalistoj, superas imagojn plej fantaziajn. Skuanta monumenteco de la puno, kiun la germana popolo ne komprenas, ĉar tiu popolo ne estis dotita per kompreno de moralaj leĝoj de la homa societo. Ano de nacio forŝirata dum la sep jaroj per mensogo-amplionoj, lacigita per longedaŭraj senhonteco de krimo kaj perforto, haltigas siajn piedojn paralizitajn pro mirego. Ho ve al tiu, de kiu venas skandalo! Io biblia ŝvebas super tiu ĉi moderna Sodomo. El teruro de ruinaĵoj indiferece grimpas loĝantaro vivanta sub la tero kiel Welsaj Morlokoj, ne intencanta kompreni, kial ĉio ĉi estis. Okuloj de rigardanto duonfermiĝas pro angoro el malfacile forigebla pruvo de rekompenco, kaj nepre ili el tiuj nesuperrigardeblaj ruinoj levas sin al la firmamento, adorante majesteco de la justeco. Forbalaitaj sidejoj de krima pensado, kiujn disbatis venka kaj timiga mano de la historio. »Forviŝitaj« urboj, en kiu vegetas venkita nacio kun nevenkebla spirito de politika stulteco. Starante super la nesuperrigardebla fantomeco de la ruinejoj, trunkoj kaj stumpoj, kiuj estis temploj, super eroj de palacoj, polvo de hejmoj, frakasaĵoj de uzinoj, vi nepre rememoros kanonon de negacio el »Adamo la kreinto« kaj vi serĉas la tabuleton vokantan: Tie ĉi staris siatempe faritaĵo de kreo.

Viroj kun mienoj, el kiu estas malfacile legi ion alian krom epok-ordono, forigas la ruinaĵojn kaj la fame fieraj virinoj germanaj kolektas por siaj venkitaj herooj en riverujoj ruinaĵaj cigared-restaĵojn, forjetitajn de okupacio-soldatoj. Vilaĝoj kaj estintaj urboj estas sternitaj de infangregoj, kiujn eduki estos problemo de proksima estonteco de la mondo. En akraj okuloj de tiu ĉi milita idar-ĝermo sidas deziro pri manĝo kaj pri rekompenco, kiu estas veneno en sango de ĉiu germana generacio. La rigardanton inundas hontosento, ke ne estiĝas kompatato. La Germanujo ne komprenas kaj tial oni ne povas helpi al ĝi, ĝi ne komprenas kaj tial estas devigata kompreni la cetera mondo.

En apokalipsa hororo de ruinaĵoj, kiuj iam estis nomataj Nürnbergo, kunsidas la internacia milita tribunalo pri dudekunu kaptitaj krimuloj, la plej grandaj, kun kiaj iam la homa justeco kontaktis. Krimuloj en larĝaj jakoj el siaj civila aŭ soldata gloroj, lacaj eksterajoj penantaj neniom rabati el malmoleco kaj firmeco de siaj okuloj, estas klardire hodiaŭ jam nur dokumentaj aĵoj en tiu ĉi teruriga proceso, kiu montras al la mondo la kriman ĉionkapablecon de la venkita nazismo. La nomoj, kiuj venkadis leĝojn, Dion kaj naciojn, tronas tie ĉi sur la akuzitoj-benke reprezentante eliton de Germanujo. Krom fiera Neurath klopodanta lacigite pri digneco, ofenditmienaj Keitel kaj Dönitz, sidas tie ĉi ĉiuj kvazaŭ ĝi ilin ne koncernus, de obtuze maĉanta Streicher ĝis maldika Hess, sendigne vidiganta timon per oftaj foriroj desur la akuzitoj-benke en la simulant-ĉelon. Frick, Papan kaj Schacht estas enuiĝintaj pro propra sorto kaj la murdema Kaltenbrunner aspektas en sia civilvesto kiel personiĝinta diableco.

Sur la atestanto-loko alternas generalaro en paliĝinta gloro de soldata sinteno, ĉirkaŭanta kaj neanta Manstein kaj suverena maljuna Rundstedt, soldata sfinkso tenanta propran personecon sur nivelo de granda aktoro, al kiu malbona regisoro trudis troiĝi la dignecon.

fiĉas likvidi la hitlerajn organizojn kaj maldungi la naziojn el la ŝtataj kaj aliaj oficialaj instancoj. Ili kredas, ke sufiĉas malpermesi ĉiun politikan aktivecon en nazisocialisma direkto dum la okupado-periodo. Sed tiu, kiu tion kredas, malbone konas la mentalecon de la germana popolo. La nazisocialismo estas nur iu plej ekstrema formo de l' germana naciismo. Tial ne sufiĉas ekstermi la nazisocialismon; tio, kio devas esti ekstermata estas la prusa naciismo, »la spirito de Potsdam«. Estis la industriuloj, la bankieroj kaj la grandbienuloj, kiuj subtenis Hitleron por frakasi la germanajn socialistojn kaj pacifistojn, tiel kreante por siaj planoj kaj interesoj deziratan sferon.

Koncerne tion la Aliancanoj montas mankon de respondeckonscio. La militistaj registaroj okupas sin nur kaj apenaŭ pri nazioj; la kunlaboron de la kontraŭ-nazioj ili sisteme malakceptas ĉe tiu laboro. La rezulto estas, ke la nazi-satelitoj estas neĝenataj, kaj se ili havas la bonŝancon posedi judan praavon, oni donas al ili bonan postenon anstataŭ la ĉelon, kiun ili meritas.

Libera tribuno, monata revuo, »sendependa, sentima, senpartieca, — por ĉiuj esperantistoj — organo de memstare pensantaj homoj,« komencis aperadi anstataŭante organon de la Laborista esperanto-kunularo »Per unu voĉo« en Johannesburg en Suda Afriko. Tiu ĉi ciklostilita revuo aperanta deponde januaro 1944 estis legajo tre interesa, precipe ĝiaj anekdotaj informoj el »De la Afrika scenejo« kaj ĝia »Elementa scienco« estis por ni ĝuoplena legajo. Sed ankaŭ la angla lingva parto estis tre leginda. La nova revuo estas pure esperantlingva, kostas por jaro tri ŝilingojn. Adreso: David Dambe, Poŝtkesto 7356, Johannesburg S. A. Por faciligi pagojn oni akceptas ne-uzitajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. La unua numero (el julio) enpresis leteron el Ĉeĥoslovakio de s-o Jan Geryk.

Ŝtatan subvencion de 5000 CrS (250 dolaroj) ricevas pojaraj Brazilaj Ligo Esperantista. (O Brazil Esperantista, Julio-Septem. 1945.)

Grupo Esperantista en ŝtato Sao Paulo titolas »Francisco Valdomiro Lorenz« por honorigi ĉeĥon, kiu estas la unua pioniro de Esperanto inter ni kaj inter Brazilanoj. La ad-

reso de la grupo estas: Caixa Postal, 777 Rua Henrique Porchat, 4, Santos. E. de Sao Paulo. (O Brasil Esperantista, 91/93, 1945.)

Bildon de prezidento Beneš enpresis Flandra esperantisto el julio raportante (flandralingve) pri permeso instrui Esperanton kiel nedevigan fakon en komercaj lernejoj slovakaj.

Rumana Esperantista Societo en Bukureŝti (Str. Atena no 1) jam ankaŭ reviviĝis. Ĝia R. E. S. *Informa bulneno*, presita, 4-paĝa, aperis en julio. Ĝi enhavas nekrologon de Henriko Harabaĝiu, la plej ĉefa laboranto rumana dum la lastaj dudek jaroj. Ankaŭ li estis murdita de germanoj. Dekoj da ĉefoj kaj slovakoj rememoras pri li el siaj karavanoj Rumanujon gviditaj de s-o J. Friedrich. — Ni enskribu tie ĉi kelkajn prezojn el Rumanio: Kvinpinta verda stelo kostas 3000 Leojn, »Fundamento de E, rumana eldono« 4000 Leojn.

Pri fremdaj vortoj diras saĝe F. Szilágyi: Estas granda demando ĉu la internacieco estas tiel konfidinda bazo, kiel oni emas kredi. Eĉ parencaj lingvoj uzas la samajn vortojn kun tute alia senco: Oni pensu ekz. pri la vorto *tos*, kies signifo en la norvega lingvo estas »knabino« (sed ne tre bonmora), la parenca sveda lingvo uzas la saman vorton kiel kareresprimon pri knabinetoj. La internaciaj vortoj ofte ne estas tiel internaciaj kiel oni kredas. Kiam mi instruis en Danujo, mi uzis la vorton »ricino« en miaj esperantokursoj pensante, ke ĉiu komprenas, ke »la ricino estas malbona« (la vorto malbona estas nekonata). Poste klariĝis ke en kamparaj lokoj oni tute ne sciis, kio estas »ricino«. (En Danujo ĝi estas »amerika oleo«). En Polujo oni ne uzas la vorton »teo«, sed la teo estas »herbata« ktp. Tiun liston oni povus pligrandigi ĝis la senfino. Sed estas ankaŭ aliaj aferoj priparolataj en tiu ĉi kontakto. La internaciaj vortoj tre ofte forguitas de sia fundamento kaj en diversaj landoj ili povas signifi la plej diversajn aferojn. El tio sekvas, ke oni devas — ankaŭ en la internacia lingvo — denove lerni la signifon precizan de la t. n. internaciaj vortoj. En Mezeŭropo oni uzas la vorton »semester« en la senco de duono de universitata studjaro, en la nordo semester estas ferio de laborulo kaj se senpripensa mezeŭropano, opinianta

La akuzo prezentas demandojn, la rusa kaj la angla lingvoj demandas en nomo de la mortigitoj, turmentitoj kaj sklavigitoj, pruvoj de neforviŝeblaj kulpoj frapas kiel martelfrapoj. Kaj la rigardanton sur la benko inundas honto anstataŭ tiuj dudekunu senhonoruloj, kiuj pretekstante grandecon en venkotempo, estas tiom mizeraj kaj malgrandaj dum sia malvenko. La vero demandas kaj la mensogo respondas, mensogo de tiranoj, despotoj, militestroj, mensogo de la nacio, kiu antaŭ nelonge pligrandigadis idaron de Uebermenschen esperante detruon kaj inundon de detruita mondo.

Eble unusola Göring konfesas kun ironia kvieto sian situacion de malgajninta ludinto, ne pensante ja pri tio, ke li detruis sian grandan familion kaj hejmon, en kiu li disdonis siajn trompajn ludkartojn. Sed ankaŭ li, aero-heroo kaj poste apogilo de aĉa konstruo de nazismo, restis malbrave vivanta kaj preferas atendi sur la akuzito-benke sian humiligan sorton ol ĝustatempe finiĝi sian perditan vivon per pafo el germana pafitubo en germanan tempion.

Sidas tie ĉi ili ĉiuj, efektivigintoj de la plej granda krimo en la homhistorio, kiuj troplenigadis ĉielon per animoj de martiroj, kiel kaptitaj bestaĉoj, kiujn rigardi venas okuloj de la lacigita mondo kun nepriskribeblaj malestimo kaj angoro. Ili sidas tie ĉi, por esti ĝapataj de justeco kaj mondpreso, balbutante siajn elturniĝojn kaj mensogojn ne taŭgajn por krimuloj de tiom giganta formato. Ili sidas tie ĉi dudekunu, najbaro en angora apudeco de nehontiĝanta mieno de najbaro, ne hontante vid'alvide rigardi okulojn de propraj mizereco kaj malgajno. Ili sidas tie ĉi en ruinoj de siaj fieraj urboj, en preskaŭ unusola nedisbatita konstruaĵo Nürnberga, en kradumita centro de siaj konfesantoj, forpelitaj en kelo-truojn kaj en mizeron de nekredebla malvenko. En la tuta mondo ortodis kuraĝe tiuj, kiuj helpadis al siaj nacioj gajni ilian aferon, kaj tiuj ĉi, kiuj ĝin tiel nepriskribeble malgajnis, restis malbrave vivantaj, preferante malestimon de tiuj, kiujn ili trompis.

Kaj hodiaŭ jam en la rigardanto estiĝas pri tiuj malagrablaj dudekunu, de kiuj mienoj en benkoj enkadrigitaj de blanka amerika polico kreas sole kulison al finanta mondtragedio, ne plu angoro sed honto. Sanga honto pro tiu ĉi senhonora aĉularo de mensogaj patosuloj, kiuj rekomendis al siaj oficiroj mortadi per honor-memortigo. Malriĉa kudristino aŭ servistino scipovas mortigi sin, se ŝi malgajnis sian koron, kaj tiuj ĉi grandbuŝaj fortuloj ne sukcesis meti revolveron al sia malkuraĝa tempio.

El la ĉefia S. K.

Josef Vitek:

Gajaj rememoroj el Svedujo

El Falun tra Hofors kun mondkonataj SKF lagrofabrikoj kaj malgranda Tursoker kondukas min la vojo norden de Gävle, en la regionon de grandaj lignoseĝejoj Söderhamn. Kvankam la kalendaro montras la 15-an de majo, regas tre malvarma, kelkhore neĝa vetero. Urboj Söderhamn, Sandarne kaj Ljusne aranĝas kvar prelegojn. Pli suda urbo, konata Gävle, ŝanĝas sian aspekton, ĉar septembraj festotagoj rememorigas la Svedojn pri la 500jara daŭro de la urbo. La urbo estas tre bela, verdula, kaj la samideanoj tre spertaj. Neniam mi forgesos ankaŭ akcepton fare de miaj samlandanoj, familio Zupanc, kies trijara Anjo rememorigis min pri mia, tiam malsana, filineto. Anjo naskiĝis en Gävle kaj tamen ŝi parolis pure ĉeĥe. La portretoj de prezidentoj Masaryk kaj Beneš, multaj patriotaj bildoj kaj libroj veniĝis al mi preskaŭ larmojn en la okulojn pro tro da ĝojo. Kaj vespere, kiam la familio aŭdis belajn melodiojn el miaj gramofondiskoj, tiam ni estis hejme, kvankam multaj centkilometroj dividis nin de nia patrolando. Por esperanto mi akiris simpatulojn vere tre bonajn. Sed bela dutaga retado finas kaj komencas mia veturo en la nordan parton de la lando. Tra Hudiksvall post duontaga veturo mi venas en unu el la plej belaj urboj de tuta Svedio Sundsvall. Ĝi situas tre bele ĉe mardeklivo kun la lago Sidsjön kaj pitoreska rivereto Selangeran. Mon'oj Nora kaj Södra stadsberget donas al la vizitinto belegan elrigardon en la tutan Medelpad gubernion, kiu ĉe proksima Skönvik en

ampleksaj lignosegejoj koncentrigas lignoindustrion de la lando. En proksima Östrand vi povas viziti unu el la plej grandaj sulfitaj fabrikoj de la lando. Dum bela sunbrila posttagmezo ni surgrimpas la jam nomitan Nora stadsberget por vidi iom da malnovaj konstruaĵoj kaj speciale t. n. plej grandan mensoĝon de Svedio, strangan beston — duonon da leporo kaj tetron, kiun iu specialisto ŝerce preparis por la ĉasistoj kaj donis ĝin en la ĉasregionon. En la teraso de la naturkafejo ni ĉirkaŭrigardas la pejzaĝon. La marenfluo, Ŝtelista insulo Tjuvholmen kaj du mejlojn longa insulo Alnön, plej granda sveda malsanulejo, tuta urba panoramo, skisaltejoj en la fono, ĉio restas en la memoro. Härnösand estas la urbo, kiu akceptas min en senkvantaj tagoj. Ankaŭ ĝi estas tre bela kun sia naturmuzeo en la proksimeco. Daŭra lumo tage kaj nokte estas io por ni nekonata kaj ne tute komprenebla. Ĝi havas tre bonan flankon, ĉar ni povas nokte ĝui la naturbelecon, kiam nia restado kelkloke estas tro mallonga kaj tamen la lokoj vizitindaj. Tio okazis en Östersund, kie mi uzas la nokton por viziti la belegan insulon Frösjön. Tie kuŝas en pitoreska tombejo fama Svedo Petersson-Berg. En la 200kilometra malproksimeco en la krepuskiĝo ni vidas la konturojn de la limaj montĉenoj kun eterna neĝo. Neforgeseblaj impresoj. La urbo troviĝas en la centro de Svedio, tamen sufiĉe longe daŭras ĝis vi atingos ĝin el la ĉefurbo. Kaj post du tagoj mi troviĝas en la plej norda Kiruna. Kia diferenco en du tagoj kaj kiom da kilometroj! Mi haltas ankoraŭ por unu tago en Sollefteo. Tuta regiono de tiu ĉi urbo estas tre romantika, speciale la bordoj de la rivero Angermanälven, laŭ kiu la provinco portas sian nomon. Kaj nun plej longa distanco dum unu tago. Frumatene elektra rapidvagonaro jam portas min norden. Post longa veturo ni haltas en Boden por duonhoro. Boden estas konata fortikaĵo. 1243 kilometrojn malproksime de Stockholm en la stacio Polcirkeln haltas la vagonaro. Kelkaj unuopuloj elsaltas kaj rapide enmetas siajn leterojn aŭ poŝtkartojn en la leterkeston, fiksitan sur la stacidomo, por ke ili havu hejme daŭran rememoron pri la trapaso de polusa cirklo. Granda tabulo svede, angle kaj france informas vin, ke blanke koloritaj ŝtonoj, rekte trasegantaj la fervojon 1 kilometron antaŭ la stacidomo montras geografian polusan cirklon. Jes, do ni estas tie kaj ni miras, ĉar nenio ŝanĝiĝas. La vivo restas sama, stacioj kaj haltejoj ankaŭ, nur ĝiaj nomoj estas finnaj aŭ laponaj, sed la loĝantaro estas sveda, almenaŭ komence. Malrapide forflugas la kilometroj kaj ni venas en la regionon, kiu enhavas la trezorojn de fera minajo, kies provizo laŭ la antaŭkalkuloj sufiĉos ankoraŭ 250 jarojn. Nur tiu ĉi minajo kaŭzis la konstruon de tiom multekosta fervojlinio nun tiom frekventita. Komenco de junio kaj la neĝo! La temperaturo ĉirkaŭ 10 gradoj C. sed la neĝo restas sur la senfinaj torfejoj. Pitoreskaj malgrandaj betuloj kun abioj estas solaj arboj de tiuj ĉi regionoj. Gällivare, urbo kun proksimume 10.000 loĝantoj havas sufiĉe vastan stacidomon kaj vi eĉ ne pripensas, ke vi troviĝas tiom geografio alte. Se vi volas viziti la minejojn aŭ almenaŭ la ĉirkaŭaĵon, ĉar oni ankoraŭ ne permesas la viziton al eksterlandanoj, vi devas ŝanĝi la vagonaron kaj post 7 kilometroj bonvenigas vin lasta stacio Malmbegget. La fervojlinio numero 4 veturigas vin 9 kilometrojn en Kóstullskulle, kie estas aliaj minejoj. Se vi vidas la unuan minejon kaj la aliajn, vi konstatas, ke ĉiuj estas la samaj, surteraj kun certa precizeco truigitaj montoj. Fortaj sirenoj atentigas la laboristojn, ke oni komencos la forpafon de minajo kaj efektive post momento salvoj, ke vi senintence rememoras nian faman Jabürek de bona memoro. Menciinde estas ankoraŭ, ke el Gällivare vi povas reveni per alia fervojlinio el Stockholm, per linio, kie la tempo ne ludas ian gravan rolon. Tiu ĉi linio kondukas proksimume en la mezo inter la limo svednorvega kaj Botnia golfo, en la direkto nordsuda kaj portas la nomon Innlandsbanen (enlanda fervojo). Ĝi servas nun por la transporto de la varo kaj la koloniistoj, loĝantaj en tiu ĉi forgesita parto de la lando. Facile okazos al vi, ke krom la viroj, priservantaj la vagonaron longajn kilometrojn vi veturas kiel pasaĝero sola, kiu forgesinte hazarde sian dormsakon dumnokte frostas kaj eltrovas plej diversajn gimnastikajn ekzercojn, ke li varmiĝu kaj forigu la pensojn pri la malvarmo. La nokton vi ne rekonas laŭ la mallumo, ĉar tiu ne ekzistas, sed laŭ pli granda malvarmo. Ŝatata suno de post junio lumas malantaŭ la polusa cirklo seninterrompe, estas do egale ĉu vi entreprenas ian ekskurson dum tagaj aŭ noktaj horoj, la suno brunigos vian vizaĝon same.

la vorton internacia kaj nekonsultante la vortaron (laŭ kiu »semestro« ne ekzistas en esp.) ekuzas ĝin en letero al sveda laboristo, nepre fariĝos miskompreno.

Tiaj pseŭdointernaciaj vortoj estas multaj, sed la fakto, ke la signifo de la internaciaj vortoj en diversaj landoj ĝlitas en diversajn direktojn, povas kaŭzi zorgojn eĉ al esperantistoj. Komencanto en Hungarlando kun hezito uzos la vorton »ordinara«, ĉar la vorto en la lando estas uzata en proksimuma senco de »vulgara«. En la skandinavaj landoj la vorto »simpla« estas uzata kun simila dubo, ĉar »simpla« signifas ja »mallerte naivan«, kiu flanksonoro mankas en la esp. signifo. En Svedlando neniu uzas la vorton »hospitalo« en la senco de malsanulejo, ĉar la sveda vorto »hospital« signifas ja frenezulejon.

Konferencoj pri Esperanto en hungara parlamento estas nomigitaj kunvenoj de esperantistoj Budapeŝtaj, al kiuj estis invititaj altaj oficistoj kaj funkciuloj publikaj kaj al kiuj estis permesite uzi dufoje kiel kunvenejon hungaran parlamentejon. La dua tia kunveo estis la 3-an de junio. Inter la ĉeestantoj estis dr-o Szoboszlai, gvidanto de ĉefurbaj instruaj aferoj, dr-o G. Kemény, sekcia ĉefo en la ministerio de edukado, dr-o Vasady-Kovács, ŝtatssekretario kaj aliaj. Ni ne legas pri ĉeesto de deputitoj. Sigm. Tiborc laŭtleĝis leteron de deputito Paulo Justus, kiu promesis energian subtenon de la lerneja instruado de Esperanto. (Laŭ Sudhungarlanda Stelo, Gyula, junio.)

Unua postmilita pollanda kongreso okazis en Łódź pentekoste 1946. Ĉeestis 102 p. el 17 lokoj. Inter aliaj prelegis dr-o Czubrynski pri »Interŝtata Esperanto-Akordo«. Diskuton elvokis la problemo pri rilato al germanaj esperantistoj. Ĉiuj parolintoj substrekis, ke pro la faritaj krimoj kaj kruelaĵoj kulpas la tuta germana popolo kaj oni decidis interrilati nur kun tiuj E-Asocioj en Germanujo, kiuj publike kondamnos la hitleran politikon kaj registaron (propono de s-o Woźicki). Prezidanto estis elektita J. Alfus el Kraków. (Pola Esperantisto, junio-julio 1946. Kraków, Rynek Gl. 34. Jarabono 100.— zl.)

Pollandaj esperantistoj murditaj fare de germanoj: Leo Belmont el Warszawa, poeto kaj akademiano,

mortis en varsovia »gheto«, Dr-o Wilhelm Róbin, vicprezidanto de TEKA, unu el la plej malnovaj esperantistoj murdita en Binsk, Izrael Lejzerowicz (Georgo Verda), ĵurnalis^o, verkisto, gazumita en Treblinki, Leopold Dreher (Leo Turno) el Kraków murdita 1941 en Lwów, Jozef Litauer, advokato el Warszawa, Edward Wiesenfeld el Warszawa, ĵurnalisto, pereis en koncentrejo, Lucjan Kukulka, pastro el Bydgoszcz, predikinto dum la kongreso en Kraków 1931 en preĝejo St. Maria, kaj aliaj pluraj. Ni ne forgesul (Laŭ Pola Esperant. junio-julio.)

Aŭstria societo de amikoj al Esperanto estis fondita de kortega konsilanto Hugo Steiner, trasuferinta ankaŭ sian arestejon dum Hitlerreĝimo. La organo de la societo Der österreichische Esperantist aperis en julio 1946. Ĝi estas tre reprezentativa gazeto, 10 paĝoj 32x23 cm, germanlingva kun esperantlingvaj tradukoj de titoloj kaj kelkaj artikoloj. Honorprezidantaro de la societo estas: Kanceliero Ing. Leopold Figl, instru-ministro Dr Felix Hurdes, komerc-ministro Dr h. c. Edvard Heintl. Poste sekvas longa listo de honor-komitato kun rektoro de Wiena universitato Dr Ludw. Adamovich sur unua loko, listoj de »Fondintoj« (kotizo minimume 100 ŝilingoj) kaj de »Subtenantoj« (kotizo minimume 10 ŝil.). Prezidanto de la Societo estas kort. konsilanto Hugo Steiner en Wien XXI, Bisamberg. Kunvenoj de gvidantaro ĉiun unuan mardon je la 16,30 en oficejo de la Aŭstria E. Federacio I., Neutorgasse 9. La ideo de societo de Esperanto-amikoj meritas atenton. Ne plaĉas al ni, ke la gazeto pretendas, kvazaŭ la Aŭstria societo estus filio de »Internacia Societo de l' Amikoj al Esperanto«. Tia societo ankoraŭ ne ekzistas kaj estas tre duba, ĉu Wien estas taŭga sidejo por tiaspeca centro.

Mankon de morala sinteno ni vidas en anonceto en Flandra Esperantisto (julio), kie anonimulo en Turku p. lok. 48 anoncas, ke li komencos eldonadi gazeton *Laborista Heroldo*. Heroldo de Esperanto barmarktis dum jaroj por estiĝi semajna gazeto, nun ĝi komencis klopodi denove por reakiri sian pozicion, kaj jen: venas homo, kiu versimile proklamas sin socialisto, kaj ŝtelas la nomon kaj ideon al la kreinto. Ni ne volas daŭrigi nian komenton. Ni estus devigataj uzi la plej akrajn vortojn. Sed ĉu kredi, ke havos



Esperanto-memorŝtono en Olomouc
solene restarigita la 10-an de junio 1946.
Apud la ŝtono dekstre: Albín Neuzil.

Ni proksimiĝas al Kiruna, kiu ekzistas en nia memoro el la lerneja studado kiel malgranda, forgesita urbeto. Eraro! La vagonaro haltas en granda impona stacio, kaj la stacidomo certe estus fiero de diversaj niaj grandaj urboj. La urbo havas 11.000 loĝantoj, elektran urban tramtrafikon, kiu vin rapide transportos eĉ en la malproksimajn urbopartojn aŭ al la minejoj, kiujn reprezentas du montoj Kirunavaara kaj Luossavaara, kies bildo restas por ĉiam en via memoro. Urbo mem troviĝas sub kaj sur deklivo, belaj stratoj, parko, parkbenkoj, akvofontano, ĉio kiel hejme dum tiu ĉi monato. Nur kelkaj rimarkoj vin diras, ke vi ne eraru — la belaj neĝkovritaj montĉenoj kun la plej alta sveda monto Kebnekaise (2123 m) sur la horizonto, kalendaro montras la 2-an de junio kaj la termometro 1 gradon C da varmo kaj sur la glaciita lago vigla fiŝkaptista vivo. Kiruna havas ankaŭ unu ekstremajon, kiun vi ne trovas en ĉefaj urboj — grandan lignan laponan preĝejon. En la urbo loĝas nur sveda loĝantaro, en la ĉirkaŭaĵo finnoj. En Kiruna estas ankaŭ la kazer-no kaj la soldatoj de montareĝimento, kiu estis tien translokita dum la lasta milito kaj jam verŝajne restos tie. En la vendejoj vi povas aĉeti amason da memorobjektoj aŭ fotografajoj, do ne estas necese, ke vi penu kun via fotilo. La laponoj vagas kun siaj boacoj de loko al loko kaj se la feliĉo staras viaflanke, ie vi trovos ilin. Ili estas malparolemaj, kaj vi malsukcesos fari iun bildon, kiu por ĉiama memoro al viaj infanoj aŭ parencoj montrus vin inter ili. Ni provis tion kun iliaj infanoj, sed ili malaperas kiel la paseroj, kiam ni nur provas preni la aparaton. Kiam ni jam estas en tiu ĉi norda parto de la lando, ni devas viziti la plej mirindan regionon de la plej ampleksa sveda provinco Laplando. Ĉiuj ĝemsideanoj de Kiruna (kaj ili ne estas malmultaj) tion konsilas kaj do ek en! Tio signifas vagonare en Abisko kaj vagi kelkajn tagojn ĉirkaŭ la glaciita lago Torneträsk. Tiu ĉi beleco povas esti komparata nur kun la plej belaj vintraj regionoj en Svisio. Proksime de turisma stacio tabuloj anoncas, ke vi troviĝas en natura parko, kie la naturo mastrumas mem kaj la homo rajtas nur rigardi. Kaj vere oni trovas multon por rigardi: montoj, kanjonoj de tre rapidaj montriveroj, arboj, lagoj kaj el la floroj rara lapona rododendro, diversaj aliaj miniaturaj kreskaĵoj, iu lapono en sia diverskolora kostumo, cervoj, ĉio vekas vian intereson kaj nur malvolonte vi adiaŭas al tiu ĉi regiono, por kiu vi bezonus ne tagojn, sed minimume semajnojn.

Plej norda fervojstacio sveda estas Riksgränsen, kiun vi devas trapasi volante viziti norvegan Narvik. Granda hotelo Lapplandia kaj aliaj turismaj entreprenoj gastigas kaj svedajn kaj norveĝajn sunbrunigitajn skiantojn. Rapida paskontrolo kaj jam la vagonaro forportas vin en Norveĝion. La stacidomoj sekvas unu la alian kaj la bildoj de la naturo unu pli bela ol la alia. Tra multaj artefaritaj kontraŭneĝaj tuneloj ni proksimiĝas iom post iom al nia celo. Baldaŭ ni vidas fjordon Rombak

en sia tuta beleco. Ni ne kredas al niaj okuloj. Ĉu la naturo povis efektive amasigi tie ĉi tiom da beleco? Dumvoje vi konstatas la batalojn de pasinta mondmilito kaj en la fino de la fjordo Rombaksboten kvin germanaj rapidŝipoj flankkuŝantaj restas kiel mutaj atestantoj. Narvik akceptas nin. Urbo tiel konata kaj tiom ofte pritraktata en la militaj raportoj de la jaro 1940. Sur ĉiu paŝo forlasinte la stacidomon vi trovas la postsignojn de la bataloj. Pli ol 900 domoj de tiu ĉi urbo estas forbrulitaj aŭ ruinigitaj. 10.000 herooj Narvikanoj, kiuj nuntempe estas en Narvik, loĝas plej multe provizore. La haveno denove ŝipirebla estas tombejo de 51 grandaj kaj malgrandaj militŝipoj de batalantaj ŝtatoj. Ĉe la marbordo Uneshoegen — memorŝtono indikas subordiĝon de Angloj. Kontraŭflanke la monto Den sovende Dronning (Dormanta reĝino 1576 m) kaj aliaj altaj neĝkovritaj montpintoj donas al la urbo neforgeseblan karakteron. Kun ŝatataj samideanoj ni vizitas ĉiujn vidindaĵojn: la rusan tombejon kun kelkcentoj da mortintaj aŭ mortigitaj rusaj kaptitoj, urban tombejon kun kelkmiloj da germanaj milittomboj kaj speciale 13 kilometrojn malproksime la plej nordan koncentrejon de Eŭropo Beisfjord. Terure! Belsen-Belsen kun ĉiuj plej teruraj eltrovoj en kopio. Du miloj da Rusoj en komuna, nune per la rusa ŝtato bele ornamita kaj aranĝita tombejo, 650 Jugoslavoj kuŝas komune apude, multaj miloj da nekonatoj en la najbareco. Pli ol 40.000 malfeliĉuloj estis internitaj en tiu ĉi terura loko. Nun la ruinoj de ĉio estas nur ilustraĵoj al nekredeblaj rakontoj de najbare loĝantaj Norvegoj. La nazistoj faris plej diversajn militkonstruajn laborojn helpe de kompanioj de fama Tot-organizo, kiuj havis tie plej diversajn naciojn kiel sklav-laboristojn. Sufiĉas menci, ke dum la liberigo de Narvik estis en tiu ĉi organizo apartenantoj de 26 popoloj, inter ili eĉ Egipitanoj. Ĉefoj estis en bona kontakto kun la lokaj esperantistoj kaj postlasis tre bonajn rememorojn inter la tuta loĝantaro.

Dankon al Vi, karaj samideanoj en Kiruna kaj Narvik, ke kun via helpo mi povis viziti paradizon de norda Eŭropo kaj iom rakonti pri ĝi, sciante, ke neniam miaj vorto povos sufiĉe por esprimi tion, kion mi vidis.

Hejmen tra Stockholm kaj Malmö, kie mi restas ankoraŭ du tagojn por finprepari ĉion por la forlaso de kara sveda lando. De Malmö al Trelleborg kaj de tie prame al pola haveno Gdynia. Dudek horojn daŭras nia transnaĝo de trankvila Balta maro kaj en vesperaj horoj sekvantan tagon akceptas nin ruinigita haveno. Granda krozŝipo germana kuŝas en la angulo, aliaj aliflanke. Urbo portas la saman aspekton. Bedaŭrinda Polio, kiu tiom devis suferi! La vagonaro forportas nin kaj matene ni troviĝas en Varsovio. Oni rakontas, ke ĝi estas multe ruinigita, sed neniuj homoj povas imagi, kiel ĝi estis ruinigita efektive. Kvankam mia tempo estis limigita, mi vizitis preskaŭ la tutan urbon kaj trovis nur tre malmultajn domojn, kiuj servas al la celoj, por kiuj ili estis konstruitaj. En vesperaj horoj mi daŭrigas mian hejmveturon kaj dimanĉe la 9an junio antaŭvespere mi renkontiĝas en la stacidomo kun miaj familianoj kaj la klubanoj post kvarmonata foresto.

Kvar monatoj, kvar plej belaj monatoj de mia ĝisnuna vivo, estas for kaj restas nur rememoroj... Vi, karaj svedaj gesamideanoj, multam faris por mi, sed kaj unuarange vi multe faris por mia renaskiĝinta ŝtato. Ĉiam mi estos fiera, ke mi povis al vi ĉiuj rakonti pri tiu malgranda mezeŭropa ŝtato nomata Ĉeĥoslovakio, kiun mi tiom amas kaj kiu por sia evoluo en la estonteco volas nur tion, kion vi ĉiuj: eternan pacon kaj amikan kunvivon de ĉiuj popoloj! Tack för eder hjälp och pa aterseende en gang till

Fino.

novajn ideojn ulo, kiu eĉ novan nomon ne scias elpensi?

Sveda gazeto por biciklistoj kaj motoristoj diversspecaj enpresas informojn esperantlingvaj kaj sendas sian gazeton al esperantistoj por 4 internaciaj respondkuponoj por la tuta jaro. La adreso estas: Cykelbilisten Saby, Svedio.

»*Semu konstante*« estas ciklostilita, unu- aŭ du-paĝa monata organo de Esperanto-Instituto »Malnova turo« Eindhoven en Nederlando. Ĝi estas katolika unuiĝo. Kvankam oni nun ofte legas pri ia unueciĝa tendenco, tamen danĝere svarmas tiaj neamplekaaj kaj senenhavaj bulnetoj. Kiu devas legi ilin? Kaj tamen ili forrabas la abonontojn de efektivaj gazetoj.

Arbetar Esperantisten-Laborista Esperantisto aperanta en Svedujo (Barnhusgatan 8 Stockholm) jam la 25-an jaron, tre bone redaktata, enhavas en sia svedlingva revuo pri movado eksterlanda tre bonan resumon de raportindaĵoj el nia Enlanda kroniko kaj el rubriko Ni legis.

Helena Esperantisto aperas jam en la 38-a jarkolekto en 23 Str. Rodou, Athinai (8). Unu numero 8-paĝa kun kovrilo kostas 500 draĥmojn. Aperas dumonate. Numero el majo-junio enhavas fakan kuracistan artikolon »*Hipertensio*« de dro A. Stamatiadis. Li rekomendas laŭ sia sperto kontraŭ tro alta sangpremo dekokton el folioj de olivujo. Sufiĉas pretigi dekokton el 65—70 freŝaj olivfolioj en proksimume 1300 gramoj da akvo. Kiam per bolido la dekokto restas kvante la duono, oni ĝin trapasigas tra kribrileton kaj post malvarmiĝo oni enboteligas ĝin. El ĉi tiu preparajo oni prenas l' supkuleron antaŭ la manĝoj (tri foje dum la tago). La sanga tensio iompostioe malpliĝas, sed estas bone ne trouzi tiun ĉi simplan kaj malmultekostan rimedon, ĉar la trouzaĉo povus kaŭziĝi la kontraŭon, t. e. hipotension.

Lingvo.

Překlad ŭkolu 3.

Verkisto kaj politikisto.

Se la politikisto volas, ke oni plej malofte stumblu¹⁾ sur la vojoj al estonto, li devas atente aŭskulti²⁾ la arton³⁾ (alie⁴⁾ oni tion scias delon-

ge), kies esenco⁵⁾ estas komprenado kaj kono,⁶⁾ estu ĝi konservita⁷⁾ en valoroj tradiciaj aŭ nur sin anoncantaj⁸⁾ en la plej kuraĝa⁹⁾ eksperimento. Komplikeco de l' arto riĉiĝas per spertoj el¹⁰⁾ fakoj eĉ la plej specialaj kaj ĝi sintezas ilin ofte pli frue ol ili ekkonas¹¹⁾ sian kaŝitan pancecon. Tial do devus politikaj agantoj¹²⁾ turni sin al ĝi kaj al ĝiaj

kreantoj, ĉu por konfirmi siajn certecojn ĉu por forigi dubojn. Mi ne scias je kioma fojo jam la verkistoj reklamacias,¹³⁾ ke iliaj nomoj ne estu utiligataj¹⁴⁾ sole por tiu publika sonoro,¹⁵⁾ ke intereso de politikistoj pri ili ne finiĝu, kiam ili estas subskribintaj tian aŭ alian manifeston.¹⁶⁾ Por ni tamen ne temas pri bredvarmo de la ŝtato aŭ de institucioj,

sed pri partopreno nia ĉe solvado de samtempaj zorgoj kulturaj kaj politikaj kaj pri reciproka kompreno de laborantoj sur la sama terpeco.¹⁷⁾ Ni ne volas, ke difinitaj formoj estu de ni okupitaj, klarigataj, ŝanĝataj kaj konjugaciaj¹⁸⁾ laŭ bezono de momento, ni volas aŭskultadi voĉojn, ne eĥojn reflektitajn de koridoj.¹⁹⁾ Ni ne volas, ke oni rapide decidu tie, kie temas pri organisma²⁰⁾ kresko, kaj ke oni ne haltigu la ekkonan procedon per formuletoj, devizoj kaj artefaritajoj.²¹⁾ Temas ankaŭ pri ekvilibro²²⁾ de osciloj inter sociala kaj kultura optimismoj. Ni certe havas plenan komprenon por politika krio kaj ni volus sole, ke la saman komprenon renkontu la medita silento kaj la kritika aŭ averta voĉo, kiu el ĝia profundeco elpuŝiĝas²³⁾ kaj ke poste tiu voĉo ne estu kalumniata kaj manturne suspektata pro transfuĝo,²⁴⁾ falso k. s.

Ni ne faras al ni iluziojn pri iutuja²⁵⁾ harmonio de ofte kontraŭaj²⁶⁾ fortoj traistantaj ekonomian kaj spiritan strukturon societatan, sed ni volus pli da okazo por solvadi tion, kio nin malkvietigas. Ni esperu, ke resonu kaj konkudoj de la verkista kongreso trudos al politikistoj pli grandan komplezemon por kunlaboro ol ĝis nun, kaj ke ili rimarkos komprenon de la prezidento de la respubliko, kiu donas ekzemplon jam delonge.

Kongresaj paroladoj ne dekretos,²⁷⁾ kiun vojon la literaturo devas iri, ili povas sole trahaki elrigardejojn kaj ju pli multaj ili estos, despli larĝaj kaj ireblaj²⁸⁾ estos la vojoj al socialisma morgaŭo.

Poznámky.

1) faletu, stumbli není v Plena Vortaro, ale hojnĉe ho uŝivá ŝkola Literatura mondo. 2) aŭkultadi, 3) belarto bývá uŝiváno spíš jen pro umĉní výtvarné, 4) alilande, aliloke, podle P. V. alie = aliloke, 5) substanco je ĉasto ve významu látka chemická nebo hmota chem. látek, 6) ekkono, scio, 7) enmetita, 8) eka-perantaj, 9) riska, 10) de, myslíme vŝak, ŝe je správnĉe klásti místo de vŝade, kde to opravdu lze, předložku jinou, aby se hybridnost de omezovala, 11) distingas myslíme nevyhovuje zcela smyslu: umĉní poznává příbuznost těch disparátních zkušeností dřívĉe, než ony samy se podle ní seřazují, 12) faktoroj; aguloj je

nezvyklĉe ale správnĉe, 13) postulas, 14) uzataj, ne: eluzataj; eluzita vesto je opotřebený ŝat. Eluzi bonkorecon de kamarado ne estas dece. Misuzi = zneuŝiti, 15) sono je málo důrazné, 16) deklaron, 17) kampo, kampobedo, ale nejspíšĉe, i když ne zcela doslovnĉe, by vystihlo polovĉdomĉ asociace s otřelým zvukem o liŝe: sur la sama sulko; nia sulko je v esperantu obdobnĉe okřídlenĉe slovo jako lícha v ĉĉĉtinĉe. 18) musí býti plný tvar, »časování« je zde zřejmĉe s přízvukem travestujícím, 19) dostaĉi, sotva je třeba dodati parlamentejaj aŭ ministrejaj, 20) rŝst obdobný rŝst:u živĉho organismu; nelze říci organika, to je jen chemie, organa je orgánový. 21) skemaroj, artifikaĵoj, maŝinaro, maŝinismo, nelze vŝak převzít z ĉĉĉtiny maŝinerio, 22) egaligo, harmoniigo, 23) eliĝas, aŭdiĝas, elkreskas 24) fuĝi = uprchnouti, transfuĝinto = přebĉhlik podle P. V. Fuĝi, jehoŝ uŝivá Hálker v Jarmiloj pasas, je zřejmĉe nesprávnĉe a vedle toho fuĝo je nemoŝné synonymon s fuĝo v hudbĉe. 25) momenta 26) antitezaj příliš umĉlé a vedle toho dialekticky nepřesné, nemyslí se snad tezo a antitezo podle Hegela, aspoň se nám tak nezdá, 27) fikso, decidus, destino, 28) irebla není tvořeno zcela logicky, iri není přĉhodné, ale slovo je v P. V. a neznáme lepší.

Doŝlo nás celkem 17 přĉkladŭ ve smĉs uspokojivé úrovnĉ. Nemŭžeme zavĉti starý zvyk nejlepšimu přĉkladateli poslati esperantskou kniŝku. Nemáme jich, Němci byli u nás stejnĉe svĉdomití v dozoru, aby nezŝstal esperantský sklad knih, jako ve vlastní zemi. A dovoz knih z ciziny je jeŝtĉ stále velmi omezen. Pro to přijmĉte zatím ũčastníci našich cvičných ũkolŭ odměnou jen náš dík a citování vlastních jmen podle abecedy. Je to seznam idealistŭ, kteří vĉří, ŝe každý ĉlovĉk mŭže pracovatí na zlepŝování svĉta. Za to přijmĉte dík dámy a pánovĉ: J. Bretschneider v Olomouci, MUDr. Jos. Černý v Litomĉřicích, Jaroslav Čížek v Praze XI, Ant. Jandík v Pardubicích, Rudolf Jandík v Čeruilovĉ, Jarmila Kubáŝková v Staňkovĉ, P. Alfr. Macek v Pulšárech, Eugen Martirko v Koŝicích, Fr. Mílek v Karl. Varech, Julius Procházka v Rajhradĉ, Láďa Proskovec v Plzni, Adolf Staňura v Radvanicích, Jan Taraba v Radvanicích, Amálie Uhlíková v Kamenici n. L., J. B. Vlach v Praze XII, Boŝena Vlĉková v Kladnĉ, Jan Zdvihal v Týnci n. S.

Lokaj informoj.

Brno. ĉe la plej granda librovendejo Komŭrka estis ekspoziciataj dum unu semajno, de la 16. 7. ĝis 27. 7. la plej gravaj k. reprezentaj libroj de esp. literaturo. Ĉirkaŭ 80 libroj okupis la ĉefan vitrinon k. la apudan, belega aranĝo, granda intereso flanku de la multa publiko, same ĉe la ĉefo de la firmo, kiu mem promesis ripeton de la ekspozicio. Por doni imagon, kiajn librojn ni montris: Plena gramatiko, Ĉs. antologio, La sankta Biblio, Romano San Michele, Per balono al la norda poluso, Eterna bukedo, Bukedo, Blanka malsano, La strato de l' fiŝanta kato, Koro, Plena vortaro, Poliglota vademecum, Teknika vortaro, Medicina vortaro, Rigardu la teron, Artistorio, Cezaro, Hura, preskaŭ ĉiuj MEP-libroj k. LM-libroj.

En la Tutŝtata filatela ekspozicio en Brno (4. VIII. - 28. VIII.) la Klubo ekspoziciis sur aparta kartono ĉiujn rusajn poŝtmarkojn kun esp. ĉiujn brazilajn poŝtmarkojn kun esp. k. sur la tria sub la titolo Esperanto en filatelo poŝtkartojn el Brazilo, Hungario, Liŝtenstejno kun esp. tekstoj, kovertojn kun poŝtmarkoj, filatelistan gazeton La oficiala buitenio, k. la Filatelan terminaron. Aranĝon de la esp. poŝtmarkoj, desegnojn sur la kartonoj faris artisme s-ano Adolf Neĉas.

Kestetoj k. vitrinoj en Brno estas jam 7, sed ilia nombro konstante kreskas. Prizorgas afable sr-oj Adolf k. Rudolf Neĉas. En unu monato ni havos ilin almenaŭ 20 ĉe diversaj komercistoj, firmoj ktp. La plej grandan vitrinon disponigis al ni nia komitatano s-ino Adamcová.

Dolní Suchá. Neŭtrala Esperantista Asocio (N. E. A.) en Dolní Suchá renovigis sian agadon. La ĝenerkunvero de N. E. A. okazis la 19. 5. La ĝeneralan kunvenon ĉeestis 14 personoj el 6 lokoj. En la estraron estis elektitaj: prez. Klimŝa E., vicprez. Sedláček R., sekr. Przewczek E., kas. Cieslar J. Vicsekr. Kajŝoŝ P. alparolis la ĉeestantojn ĉefe je temo: Postmilita Esperanto-movado. Lia parolado estis tre interesa. Vin tre N. E. A. aranĝis Esperantokurson. La kurson vizitis 7 personoj. Kurson gvidis prez. Klimŝa E. Ĉiujn korespondajojn direktu al adreso: Neŭtrala Esperantista Asocio, Dolní Suchá.

Hradec Králové. Post libertempo rekomencis la klubaj regulaj kunvenoj la 4-an de septembro. - La 29-an de aŭgusto je la 20 horo aranĝis E. K. publikan prelegon de L. C. G. Long, sekretario de Asocio de katolikaj esp-istoj en Nederlando, pri *Nederlando en la lasta milito*. Estis projekciataj mallarĝaj filmoj pri ruinigo kaj rekonstruo de Rotterdam-haveno, pri la Rotterdam-haveno, insulo Walcheren, reveno de longan-taro en la urton Arnhem kaj sonfilmoj disponigitaj de la nederlanda registaro. La prelego estis en halo de la muzeo kaj tradukis ĝin s-o J. Vítek.

Litoměřice. En junio havis mallongam kurson por skoltoj s-o MUDr Jos. Cerný.

Meziričko (p. Měřín). S-o Jan Zeman komencis instruadi Esperanton en la loka garnizono. Li komencis la 26-an julio. La kurson vizitas 32 soldatoj, ĉiumarde kaj ĉiuvendrede. Ĉiuj partoprenantoj tre diligente lernas kaj interesigas pri esp. movado. La kursgvidanto informas la kursanojn ankaŭ pri esp. movado ĉe ni kaj en la fremdlando.

Přelouč. Loka kleriga komitato (Místní osvětová rada) aranĝis la 7-an de septembro publikan prelegon de s-o JUDr Josef Fousek, advokato »Pri Esperanto kaj ĝia tutmonda signifo« en Masarykdomo je la 20 horo. La vizito estis tre kontentiga, la resonado bonega.

Verneřice. S-o R. Zvěřina, studenta la A-kurson en Doksy, gvidas kurson por skoltoj.

Novaj libroj.

La virneta en bluo kaj aliaj rakontoj, originale verkita de Mason Stuttard. Prezo 3 ŝil., aŭfranko 3 p. aŭ 13 internaciaj respondkuponoj. The Esperanto Publishing Co Rickmansworth, Herts, Anglio. Mendu ĉe IEL. 150 paĝoj. - Estas plezurraporti pri libro tiom plaĉe kaj zorge presita kiel tiu ĉi kolekto de 13 originalaj rakontoj, el kiuj la unua estas la plej longa. La verkisto estas tre lerta rakontanto kaj majstro en facila stilo, kiu daŭre estas kinstalklara kaj ĉiam esprimas ĉion per klasikaj instrumentoj de la lingvo zamenhofa evitante ĉiam ajn logadon neologisman. Estas ofte ĝuo legi tiajn frazojn kaj parolturnojn. Bedaŭrinde la temoj de la rakontoj

mem estas ofte jam ne tre sed tro konataj anekdotoj rakontataj multvorte. Ekzemple la antikva mezeŭropa brilega anekdoto pri judo, kiun oni rifuzis al funkcio de preĝejservisto, ĉar li ne sciis skribi, kaj kiu poste marĉandante fariĝis grandkomercisto, estas tie ĉi rakontata (La subskribo) sur dek paĝoj. Sed eĉ sperta leganto amuziĝas en sentimentala humoro, nun, pardonu, ne sen larmoj, rememorante la rakontintojn iamajn kaj sentante la bonkorecon de la rakontanto nuna.

Th. Kilián: Esperanto. Uĉebnice a ĉitarĉka. IV. vydání. 13-16 tisíc. V Brně 1946. Knihotiskárna a nakladatelství Pokorný a spol. v Brně. 112 stran. V papírové vazbě 39 Kčs. Pozdravujeme prvé poválečné vydání učebnice esperanta s upřímným potěšením mimo jiné také proto, že je to čtvrté vydání učebnice, jež svou pěknou úpravou typografickou a nízkou cenou od roku 1933 mnoho vykonala. Zvláštností Kiliánovy učebnice je mezinárodní čítanka »La mondo rakontas«, v níž je 50 krátkých textů, napsaných pro učebnici od 50 autorů z padesáti národů. Pozornost také zasluhuji oba slovníčky tištěné typami úspornými a přece velmi čitelnými.

Mia nova libro de *Esperanto-ĉeĥa konversacio* kaj la 5-a eldono de la *Lernolibro por memlernantoj kaj kursoj* (laŭ nova metodo) kuŝas en manuskripto ĉe la eldonisto. Neniel mi kulpas pri prokrasto en ilia eldono.

Julie Šupichová.

Ĉeským esperantistům, kteří si koupili můj »Slovníček cizích slov«, vydaný 1944 v nakladatelství A. Dědoucek v Třeběchovicích p. O., bych ráda řekla, že část nákladu této mé knížky byla vysazena bez mé kontroly, takže jsem nedostala ani kartáčový otisk textu. Nemám tudíž viny na četných a, bohužel, velmi závažných chybách tisku.

Julie Šupichová.

Ĉiu membro de nia Asocio aŭtomate fariĝas Asocia-membro de *Internacia Esperanto-Ligo*.

Sed por ricevi la jarlibron kaj gazeton »Esperanto Internacia« oni devas aliĝi kiel individua membro kaj pagi la jarkotizon 90 Kčs.

Ĉefdelegito de IEL: Jaroslav Šustr, Praha I, Benediktská 11, konto de poŝta ŝparkaso 94.744.

Aliĝu! Anoncu vin ankaŭ kiel delegito, se vakas en via loko.

En ĉiu biblioteko estu fama satira romano de Jaroslav Hašek,

»*La travivaĵoj de la brava soldato Švejk dum la mondmilito*«.

Ricevebla ĉe SAT peranto Josef Patera, Plzeň, Dvořákova 24 por nur 35 Kčs.

Korespondi kun ĉs samideanoj deziras: S-o Nikola M. Pašoff, studento, Singirci - Elena, Bulgarujo.

Korekto. Sur paĝo 28 linio 11-a de malsupre (artikolo de J. Vítek) legu instrui anstataŭ lerni.

Atentigo por membroj de Esperantista Klub en Praha: Bonvolu pagi Viajn kotizojn (Kĉs 100.—) ĉiam nur pere de la Klubo, kiu aŭtomate transdonas la destinitan parton al EAĈSR. - Per tio Vi faciligos al ni la administradon kaj ŝparos kiel al Vi tiel al ni pluaĵn elspezojn k. laboron.

Úkol 6.

Předkládáme dnes svým spolupracovníkům text z politické filosofie. Překlady raďte poslati do 30. října.

Sám Marx přes všechno pomíjení mravního hlediska a přes všechno spatřování důvodů lidského jednání v materiálních pohnutkách byl svým životem služebníkem velkého mravního ideálu — osvobození širokých vrstev pracujícího lidu od útlatku a vykořisťování. Sám ve svém životě nesledoval materiální cíle ani osobně, nýbrž sloužil svému mravně vysoko stojícímu ideálu. Praxe komunistických stran vynutila si další ústupky, na př. opuštění mravně lhostejného stanoviska k pevnosti rodiny a nové posílení rodinných pout v Rusku, vysoké hodnocení stranické věrnosti a loyality, boj proti zločinnosti, tuláctví, zahálce a j. Další vývoj komunistických stran půjde ve smyslu přijímání dalších mravních zřetelů do akčního programu a do politické praxe, neboť síla společenských poměrů vynutí si další respekt k samotným podmínkám společenského života, mezi nimiž na prvním místě je soustava mravních norem. Otázkou zůstává jen ono mravní rozmezí, ležící nad normami, které se i v politické praxi vnucují samy sebou. Má-li politická strana ponechávat stranou svého politického úsilí všechny jemnější mrav-

ni normy a vyšší mravní úsilí? Může svou taktiku považovat za pouhou šachovou hru bez ohledu na mravní normy své společnosti?

Podle našeho přesvědčení moderní politická strana nejen nemá, ale ani nemůže se spokojit s takovým minimum mravních norem, vynucovaných silou poměrů, a s pomíjením všech ostatních. Ještě nikdy politické strany neměly ve svém programu cíle tak široké a tak bohaté jako moderní strany politické a ještě nikdy neměly tak početné a tak silné a účinné prostředky, jak těchto cílů dosáhnout. Moderní politické strany zasahují svým programem

nejen do úzce vymezeného veřejného života, nýbrž do všech ostatních složek života společnosti, především do života hospodářského, do vojenské i předvojenské výchovy, vychovávají svůj vlastní dorost, mají svůj kulturní program, některé mají dokonce své historiky, své filosofy, zasahují do výchovy školní, do vedení měst, zkrátka do všech oblastí společenského života. Dokud šlo politickým stranám o otázku dynastie, o politickou svobodu, o odstranění nerovnosti občanů a podobné cíle, omezovala se jejich činnost téměř jen na pole veřejné a politické. I když ani na poli veřejného života nebylo

možno zcela pomíjetí svět mravních hodnot (některé politické cíle, jako svoboda občanů, měly přímo mravní obsah), bylo to snazší než v moderní době. Dnes, kdy politické strany svou činností zasahují do většiny společenského života, má oddělování politické činnosti od mravního úsilí mnohem vážnější následky. Je-li téměř do všech složek politického života zasahováno rukou mravně lhostejnou, vede to ke snižování mravní úrovně téměř celé společnosti.

(Dr. O. Machotka v Svob. zítřku, 29. VIII. 1946.)

KRONIKO ENLANDA.

Someraj esperanto-kursoj en Doksy estis tre sukcesaj. Partoprenis en

Kurso A (Cseh-metoda por komencantoj) 32 p., instruis s-oj Šolc, Špūr, Slanina.

Kurso B (por progresintoj) 21 p., instruis Šolc, Špūr, Hanuš, Vrba.

Kurso C (por funda lingvostudo kaj preparo de instruontoj) 27 p., instruis Šolc, Špūr, Hanuš, Vrba.

Oratora kurso (aldonita al la plano) por B- kaj C-kursanoj; instruis Slanina.

Sume do partoprenis 80 personoj.

Instruado komencis dimanĉon la 21-an de julio kaj daŭris ĉiun tagon de la 8-a ĝis la 12-a horo merkredon 31-an de julio. Gvidis ĝin K. Šolc. Ĉeesto de kursanoj estis ĉiam kompleta. Posttagmezoj kaj vesperoj estis plenigitaj per societaj aranĝoj kaj prelegoj, kiuj ebligis, ke la kursanoj en amika konversacio uzadu tuj la akiritajn sciojn kaj spertojn. Kompreneble ankaŭ la komunaj tagmanĝoj kaj vespermanĝoj precipe en hotelo Bellevue helpis krei societajn kaj amikajn rilatojn inter la kursanoj.

Prelegoj estis prezentitaj al B- kaj C-kursanoj de samideanoj prof. Kožený, Malík, dro Pitlík, Pytloun; dro Kamarýt vizitis ĉiujn tri klasojn kaj alparolis la kursanojn.

El la ceteraj entreprenoj estu tie ĉi enskribitaj la ĉefaj: Ekskurso al kastelo Bezděz, kie s-o J. Mařík esperantlingve informis pri la kastelo kaj ĝia historio; A. Glud esprimis vidmanieron de dano pri ĉeĥa kastelruinaĵo; teatraj amatoroj prezentis improvizitan sceneton Markizo kaj markizino. — K. Šolc legis el originala literaturo sub la ĉielo sur strando. — Boatkonkurso en la Mácha-lago; unuan lokon gajnis samideano Papala el Karvinná. — Tri filmvesperoj kun mallarĝa filmo (la unua en la ĝardeno de hotelo Bellevue), kie s-o Slanina projekciis amerikajn groteskajojn. — Komuna forkantado de ĉeĥaj popolaj kantoj en esperantlingva traduko, gvidita de s-o Špūr, kiu gvidis la 60-voĉan ĥoron sub la fenestrojn de prezidanto Malík kaj redaktoro Kamarýt. — Bivaka fajro aranĝita de s-o Špūr, komentariata de s-o Slanina. Estis kantataj esperantlingve ĉeĥaj kaj originalaj kantoj, A. Glud kantis danajn kantojn pri amo, Šolc rakontis pri siaj vojaĝoj al Italio kaj Danio, Slanina pri sia vojaĝo Parizon kaj pri la pariza mondespozicio, Rauwolf pri instruistaj spertoj, J. Mařík kun granda sukceso deklamis la Lukáš-tradukon de la poemo »La

saliko« (de Erben). — Adiaŭa vespero mardon en hotelo Sparta (kvankam oni ankoraŭ merkredon diligente instruis kaj lernis); estis ripetita prezento de la filmoj; s-o Hanzelka prezentis kantojn en silezia dialekto; dro Pitlík verkis ĉeĥan poemon por ĉeestantinoj en Doksy pri lago kaj amparo, kiun belege deklamis f-ino N. Konopová, ĉarma »markizino« el Bezděz; al la instruantoj kaj gvidintoj de la kursoj estis de la lernintoj donacitaj libromemorajoj kaj konjako; poste oni dancis fervore. — Tiujn ĉiujn distrajn programojn aranĝis kaj estris s-o Slanina, li estis ĝenerale laŭdata sed oni riproĉis al li, ke li kulpas pro multaj koroj rompataj.

London estis ĉiuj kursanoj ekzamenataj de la gvidanto de la kursoj K. Šolc. La ekzameno estis skriba, tasko estis temo laŭ propra elekto. Lasis sin ekzameni sume 77 kursanoj kaj ricevis pri tio atestojn. La tri plej bonaj, po unu el ĉiu kurso, ricevis kiel premion vitran facetitan pokalon: Marie Borutová, instruistino el Kobylí na M. (kurso A), Milada Pohorská, oficistino el Chroustovice (kurso B), Jan Valeš el Praha (kurso C).

La oratora kurso finiĝis per konkurso. Kiel juĝantoj funkciis: A. Malík pri oratora maniero, dro Pitlík kaj dro Vaněk pri lingvokapableco, K. Šolc kaj prof. Zevl pri sintenado antaŭ la publiko. La unuan lokon gajnis J. Valeš el Praha, kiu atingis ĉiujn 30 atingebajn poentojn.

La akcepto de la kursoj ĉe la banloka publiko kaj ĉe la urba estraro estis tre afabla. Apartan dankon meritas lernejestro sinjoro Severa, kiu disponigis al la kursoj lernejon kun ĉiuj bezonaj iloj. Li mem partoprenis la A-kurson kaj finis ĝin kun tre bona sukceso. La aranĝantoj lokaj, gvidataj de s-o V. Špūr, turnis la atenton de la publiko al la entrepreno tre dece kaj sukcese. La ekspozicio tre plaĉe instalita en ejo sur la ĉefplaco, kesteto kun informoj kaj presajoj, longaj kaj larĝaj rubandoj pendantaj trans stratoj, pentrita afiŝo pri Regiona kunveno sur strand-kiosko, grandaj flagoj sur la hoteloj Grand kaj Bellevue atentigadis pri ni tre reprezente. La humoro de ĉiuj kursanoj estis tre bona kaj kiam ili kaj la instruantoj merkredon adiaŭis reciproke, ĉiuj asertis je revido en Doksy venontan someron.

Regiona kunveno en Doksy 27.-28. VII. kunvenigis 95 anojn el multaj lokoj de la respubliko. Ĉeestis kiel gasto tre ŝatata kaj ŝatinda samideano Arne Glud, universitata studento el Danujo.

La sabaton vespere estis *Amuza vespero* en hotelo »U jelena« kun jena programo, tute esperantlingva:

1. Komuna aŭskultado de la *Esperant-lingva disaŭdigo mallongonda* je la 21-a horo. Legis s-o R. Hromada. La dua kvaronhoro de la programo estis dediĉita speciale al la kunveno kaj s-o Hromada donis en ĝi tre instruan lecionon pri elparolado kaj akcentado. La aŭdeblo estis bona kaj la ĉeestantoj vidigis rimarkindan atenton al tiu ĉi tre grava temo. 2. *Prezentado de mallarĝaj filmoj*: Maja revolucio en Praha, Entombigo de Zamenhof en Warszawa en 1917, Preĝo sub la verda standardo deklamata de Zamenhof. La originalon de la dua filmo donis al s-o Slanina sinjorino H. Nováková. S-o Slanina farigis kopion sur mallarĝan filmon (9,5 cm), aranĝis ĝin, faris esperantlingvajn titolojn kaj enkondukon. La tria filmo estas ankaŭ el muta filmo de Zamenhof deklamanta la Preĝon kombinita kun maŝinskribita teksto de la poemo. Liveris ĝin esperanto-verkisto kaj filmreĝisoro Jean Forge. Ĉiujn tri filmojn projekciis s-o A. Slanina. — 3. Unuakta komedio »*Malamiko de virinoj*« originale verkita por tiu vespero de Ant. Slanina, kiu ankaŭ reĝisoris. Aktoris kursanoj, kelkaj el la elementa kurso, ne diferencataj per sia elparolado de la progresintoj. Aktoris: samideaninoj Konopová, Bendová, Šobová, samideanoj Valeš, Švarc, Patera. La publiko tre amuzis pro la komedio same kiom pro la rolantoj. — 4. *Kantoj danaj* kantitaj de samideano A. Glud kaj *kantoj ĉefaj* kantitaj de rondo kantema. — 5. *Danco*, kiu estis entuziasma kaj daŭris ĝis fino.

La *laborkunveno* dimanĉon komencis je 9,30 horo. Malfermis ĝin prezidanto de la Asocio s-o Adolf Malík salutante la ĉeestantaj reprezentantojn de la urbo Doksy kaj ĉiuj ĉeestantojn precipe samideanojn Stan. Kamarýt kaj lektoron dron Augustin Pitlík. Poste li skizis nian iniciaton pri regionaj perantoj. (Ĉiuj preferas diri perantoj anstataŭ gvidantoj por per nenio rememorigi la dirmanierojn nazismajn). Ĉefa celo de regiona peranto estos organizi la movadon en sia tuta regiono tiamaniere, ke li prenu sur sin kaj siajn kunlaborantojn ĉiun organizan laboron, precipe ankaŭ la korespondadon kun ĉiuj aktivuloj de sia regiono. Tial li devas serĉi por si perantojn en ĉiu distrikto. Grava helpo por ĉiu regiona peranto estas la Regiona Laborlernejo ÚRO en la regiona urbo. La prezidanto faris la liston de koncernaj adresoj kaj telefonnumeroj, kiun li disponigas al la perantoj. Ĉiuj ĉeestantoj, kiuj parolis pri tiu iniciato, aprobis ĝin. S-o Šolc, peranto de la regiono III, solene proklamis, ke li klopodos, ke lia regiono estu modela. En nomo de la E. K. Hradec Králové salutis la kunvenon ĝia prezidanto Pytloun, kiu petis, ke la kluba sekretario Vítek faru deklaron. Vítek, reveninta antaŭ nelonge el sia prelegvojaĝo el Svedujo, brue salutata, legis sian artikolon pri modela funkciado de IEL-delegito. Per tio finis la unua punkto de la programo.

Poste Dr Stan. Kamarýt donis mallongajn informojn pri senco kaj celo de la E-ekzamenoj antaŭ la Ekzamena komisiono de la Asocio, kaj lektoro Dro A. Pitlík rememorigis, ke estas 25 jaroj post la universala kongreso okazinta en Praha.

Dua punkto programa estis Esperantista somerrestadejo. Prezidanto Malík resumis la argumentojn, por ke tia somerrestadejo estu starigita en Doksy. La kunveno konsentis kun la diritaj motivoj laŭ ilia pozitiva eĉ negativa flanko. Prezidanto de la Loka nacia komitato sinjoro Vachuška en nomo de la urbo promesis

al ni ĉiuspecan, ne sole moralan, subtenon por tiu celo. Laŭ propono de la prezidanto la kunveno decidis ĉiesvoĉe komisi la Asocian komitaton krei la esperantistan somerrestadejon en Doksy.

Kiel komisiito de la komitato por trakti kun la lokaj aŭtoritatoj estis nomita kun ĝenerala aprobo s-o V. Špŭr.

S-o K. Šolc anoncis, ke la kursanoj kolektis inter si 50 ĉefajn librojn por donaci ilin al la urba biblioteko. Du pezaj paketoj da ili estis transdonitaj al la ĉeestanta urba bibliotekisto, kiu esprimis dankon al la donacintoj.

La prezidanto finis la kunvenon per danko al s-ro Špŭr kaj al ĉiuj ceteraj, kiuj helpis en aranĝo de tiu ĉi sukcesa regiona kunveno.

Sekvis komuna tagmanĝo en bona humoro.

Post la tagmanĝo veturis la partoprenantoj en du aŭtobusoj al kastelo Bezděz kaj reveninte ili adiaŭis al la gastigantoj asertante, ke venontan jaron ili ĉiuj venos en la restadejon esperantistan.

Dum la du tagoj de la kunveno preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj vizitis la bele instalitan Esperanto-ekspozicion en ĉefa placo. La aranĝo estis ĝenerala laŭdata.

La banloko estis verdula. Esperantistoj estis vidataj ĉie: en la urbo, en la arbaro, sur la lago, en la lago, en la kastelo, en la restoracioj, en la dancejoj.

★

Petskriboj al Urvigita Naciara Organizo (USO) revenas kun subskriboj. La ricevitaĵoj ni sendas al la oficejo de IEL, en la septembra numero de Esperanto Internacia estas indikite, ke el Ĉeĥoslovakio venis jam 6175 subskribitaj folioj. La sumo el la tuta mondo estas ĝis 6-a aŭgusto 106.314. La sama numero de E. I. enhavas artikolon de nia komitatano T. Kilián, kiu insistas por pli fervora subskribolektado. Li mem kolektis kaj forsendis jam 1124 subskribojn. Ni diru tie ĉi nian publikan dankon al li. Ni diru ankaŭ sincere, ke ni atendis multe pli rapidan ricevon de subskribitaj folioj. Ni presigis ĝis nun 40.000 foliojn, ĉiuj estas momente dissenditaj, sed la pli granda parto da ili ankoraŭ ne revenis al ni. Ni ricevas urĝajn petojn pri novaj folioj, sed la subskribitaj ne revenas en kontentiga nombro. Ni presigos ankoraŭ novan kvanton. Sed ni urĝe petas la ricevintojn renovigi ilian fervoron kaj klopodi por ricevi subskribon sur ĉiun de la akceptitaj folioj. Memoru samideanoj: ĉiu rajtas subskribi, ĉiu subskribo valoras, ne diferencigu laŭ socia situacio de la subskribonto! Sed klopodu, ke la nombro de subskriboj el nia lando estu efektive impona!

Gazeta servo nia aperigis kaj dissendis al kunlaborantoj du paĝojn de prepretaj artikoloj ĉeflingvaj, kiuj jam aperas en diversaj gazetoj. Ni dankas al la sukcesaj kunlaborantoj. Ni samtempe petas ilin, ke ili ne forgesu sendi al ni pruvon pri sia laboro sendante al ni koncernan eltranĉaĵon el la gazeto, kie la artikoleto aperis. Ni vo'onte repaĝis al ĉiu liajn elspezojn. Ĉiuj, kio koncernas la Gazetan servon, sendu al Asocia sekretario J. Mařík en Praha II, Krakovská 20.

Fino de la duvo en la neutrala movado. La 21-an kaj 22-an de julio okazis en Bern kunsido de reprezentantoj de Internacia Esperanto-Ligo el Londono kaj Universala Esperanto-Asocio el Genève por interkonsenti pri kunfandiĝo de la du organizaĵoj. Prezidis

D-ro Edmund Privat, partoprenis C. C. Goldsmith, Hans Jakob, Hans Kürsteiner, G. Rotach. Oni trovis favoran bazon, kiu estas nun submetata al ambaŭ komitatoj por aprobo. Laŭ ĝi restos gvido de la aferoj en Londono, redakto de organo kaj kontrolo de servoj en Genève. Per aprobo de tiu ĉi interkonsento estos plenumita deziro de multaj esperantistoj, kiuj pensas, ke ekzisto de unusola organiza'o multe helpas al kresko de nombro de esperantistoj organizitaj. Ili esperas, ke la kotizoj alfluos poste en multe pli impona kvanto. Nun estas ebleco pruvi tiun supozon! Klopodu, ke ankoraŭ en tiu ĉi jaro aliĝu novaj samideanoj al IEL pagante al numero 94.744 de poŝta konto de la ĉefdelegito J. Šustr en Praha, la kotizon 90 Kčs por MA! Kaj krome! Tiuj, kiuj jam estas membroj, anoncu sin tuj kiel IEL-delegitoj! La listo en la Jarlibro estas hontige mallonga. Ek, ek! Anoncu Vin, ne grumblu pri la skismo, fariĝu delegito!

Mi, Vi, ili, oni ridu, eĉ se motivo mankas!

Sinjoro Pruntulo venas hejmen kaj trovas sian edzinon en brakoj de fremda viro; li ekscitiĝas kaj krias: »Kion mi vidas? Ĉu min trompas okulparo mia?«

»Ho sinjoro, ho trankviliĝu, tute ne«, respondas la fremda viro, »sole edzino via«.

★

Juna sinjorino svelta kaj altstatura dancas kun sinjoro malpli alta je unu kapo. Pro manko de iu alia ideo li diras al ŝi: »Fraŭlino, vi ja estas granda.«

Kaj respondas la akso, ĉirkaŭ kiu li estis turniĝanta: »Nu, pardonu, sed pro vi mi tamen ne fortranĉigos min.«

★

»Ĉu vi ne hontas, Jarinjoo? Vi estas nur dekdu-jara kaj portas en la mansake'oj pudrujon?«

»Ho ne, onklinjo, ĝi ne estas pudrujo, ĝi estas cigaredujo...«

★

»Mia fileto, sinjoro instruisto, havas ofte originajn ideojn; ĉu jes, sinjoro instruisto?«

»Efektive, patrino moŝto, precipe se ĝi koncernas ortografion.«

★

»Pro kio vi havas tiom malpurajn manojn, sinjoro Abelo?«

»Hu, sciu, mi iras el stacidomo. Mia edzino forveturas, do mi karesis lokomotivon.«

★

A: »Ho vi bravulo, kiamaniere vi sukcesas mastrumi el la salajro?«

B: Simple. Aŭskultu! 60% por manĝado de la familio, 30% loĝado, 10% fumado, 25% vestado de korpaj piedoj, 10%...«

A: »Sed tio ja estas jam pli ol 100%!«

B: »Bedaŭrinde.«

★

Oratora perlo:

Civitanoj, vi nepre devas fidi al mi. Mi ja ne ŝanĝas mian konvinkon ĉiujare kiel mian ĉemizon!

★

»Akuzito, kial vi tiom disbatis sinjoron Birdĉjon, ke li estis kunkudrota sur kvin lokoj?«

»Li ja estis, tre honorinda tribunalo juĝa, kontraŭ la ĝentila balot-batalo.«

★

Geedza radio.

Dum epoko de svatado estis li disaŭdiga aparato kaj aŭskultadis.

Dum la postedziĝa vojaĝo estis ŝi disaŭdiga aparato kaj aŭskultadis li.

Nun, en zenito de la geedza vivo, disaŭdigas ili ambaŭ kaj la najbaroj aŭskultas.

★

Kio estas burokratismo? Se oficejestro postulas de subulo, ke li anoncu sian malsaniĝon du tagojn antaŭe, kaj komandanto de fajrobrigadistoj sciigon pri brulkatastrofo almenaŭ 24 horojn antaŭe.

★

»Kial vi ne havas liton en la ĉambro? En kio vi dormas?«

»En kunveno.«

★

Logiko:

»Ĉu vi pensas, ke oni povus fari ion sen mono?«

»Jes, certe, la ŝuldojn!«

★

»Kiel plaĉis al vi la parolado de sinjoro kandidat-deputito?«

»Malbone!«

???

»Unue: li ne parolis ĝin, sed laŭtlegis.«

???

»Due: Li nescias laŭtlegi, tial li legis ĝin malbone.«

???

»Trie: Ĝi ne estis leginda.«

★

Kaj fino estas versojoj!!

Abonantoj kaj legintoj karaj,
ĉu okuloj viaj estas nun amaraj?

Ĉu sprita'oj tiuj Vin ridigis?

Ĉu, ho ve, enue Vi rigidis?

La sprita'ojn en *Dikobraz* ni trovis,
pli bonegajn serĉi nek ni provis.

Kiu la daŭrigan volas, helpu agrable!

Kreu humoraĵojn laŭ la mod', kaj sendu afable!

S. K.